

193
STIFRO

El la enhavo:

Manifesto 2000

100 jaroj de Esperanto

en Ĉeĥio

40 jaroj EK Ĉ. Třebová

Kelkaj interesaj vortoj

Adonido Ratiškovice

Lingvaj ludoj kaj enigmoj

Ĉeĥio dum jarcento

2
2000

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



ADONIDO - HLAVÁČEK

Kulturan programon prizorgis ankaŭ infanoj

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare.
Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)
rete: starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto
ĈEA: cea@tnet.cz, www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotoj: A 200 Kč, B 100 Kč, D
50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč
(Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj,
enskrubo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 490 Kč komencantoj,
450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,
152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta,
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-
na, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de
esperantaj-kolektantoj

Komisioj de ĈEA: gazetara-informa,
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603
00 Brno, tel. 05/4323 3047 (eksteraj rilatoj
honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252
29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso
02.9912126 (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384
11 Netolice (sekcioj)

Sekretariino: Květa Krajičková, Esperanto,
p.s. 1069, 111 21 Praha 1 (membrobazo)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170
00 Praha (konferencoj, seminarioj)

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253 (EK,
kulturo)

Komitatano: Lucie Karešová, Tylova 1262,
508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado,

junulara sekcio, ĉefdelegito de UEA)

Kontrolgrupo de ĈEA: Vlastimil Kočvara,
Ant. Sovy 10, 747 05 Opava, tel: 0653/611
823, Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09
Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61
Bludov

Ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová,
Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší

• **Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724
0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj)

Lingva kontrolo de ĉi tiu numero: Věra
Podhradská, Miroslav Malovec

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A.
Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332
278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

Esperanto-muzeo: Jirí Pištora, Městské
muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Variabilní symboly pro platby ČES

- | | |
|--------|-------------------------------------|
| 311 | expedice, úhrada koupených knih |
| 604.2 | pisemné kurzy |
| 604.3 | předplatné Starto |
| 668 | dary svazu |
| 694 | členské příspěvky ČES |
| 694.1 | členské příspěvky UEA |
| 789.1 | sekce mládeže |
| 789.10 | sekce šachistů |
| 789.11 | sekce sběratelů |
| 789.13 | Sciencia revuo |
| 789.15 | ediční fond |
| 789.17 | sekce nevidomých |
| 789.3 | sekce železničářů |
| 789.7 | sekce pedagogů |
| 789.71 | ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo) |
| 80500 | Ediční fond Anny Milatové |

Variabilní symbol uvádějte na přední straně
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK
PŘÍBRAM apod. Zároveň uveďte i variabilní
symbol. Dojde-li platba s označením „ČESKÝ
ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme,
kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako
dary svazu.

ISSN 1212-009X

100 jaroj de la ĉeĥa Esperanto-movado

Komenciĝo de la organizita movado

Kvankam la unuan lernolibron por ĉeĥoj verkis F.V. Lorenc jam en 1890, la veran movadon startigis nur la dua lernolibro, kiun en 1900 verkis kaj eldonis Theodor Ĉejka kunlabore kun Valentin Bilík kaj Jan Holub. Poste en 1901 Karel Pelant kaj Jan Kajš kun helpo de la parlamentano Josef Hybeš fondis en Brno "La unuan societnon de aŭstriaĵ esperantistoj", kiu estis antaŭulo ne nur de EK Brno, sed ankaŭ de nia asocio.

Festado de la jubileo

EK Brno preparas por la venontjara printempo renkonton omaĝe al la unua nialanda E-organizaĵo. Ĝi povos esti samtempe nia kontribuo al

Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001

kiun verŝajne proklamos en ĉijara oktobro la Eŭropa Konsilio.

Kio estis farita dum la jarcento?

Sinsekve laboris 14 Esperanto-organizaĵoj kun kvindekda kluboj kaj kvardekda periodaĵoj. Eldonitaj estis ĉirkaŭ 700 publikaĵoj. Realigis miloj da kursoj, kulturaj programoj, renkontoj, aranĝoj klubaj kaj sekciaj.

Nuntempa stato

Al novuloj ni povas proponi elekton el kvar lernolibroj (*Kilian, Barandovská, Chrdle-Chrdlová, Cink*), tri vortaroj (*Filip, Hromada, Kraft*), tri tendaroj (*Lančov, Nekvasov, Sebrnice*), ĉirkaŭ 60 kluboj kaj 10 sekcioj. La heredajon

de la pasinteco prilaboras Esperanto-muzeo en Česká Třebová. Esperanta literaturo estas enkomputiligata kaj prezentata en Interreto.

Kampanjo 2000

starigis tri ĉefajn celojn: *levi la organizan kaj idean nivelon de Esperanto-komunumo, levi la prestiĝon de la internacia lingvo kaj influi la internacian vivon.*

Perspektivoj

Levi la prestiĝon de E-o povus precipe gigantaj vortaroj E-Ĉ kaj Ĉ-E, kompareblaj kun plej grandaj vortaroj de mondlingvoj. Ili pruvus, ke E-o ne estas nur lingva ludilo, sed serioza riĉa komunikilo, bone preparita por sia internacia tasko. Ni bezonas ilin almenaŭ en elektronika (komputila) formo.

Due ni bezonas ĉeflingvan libron pri Esperanto, ne varbilon, sed seriozan informilon pri la problemoj.

Trie ni bezonas enkomputiligi la ĝisnunan literaturon, eldonitan kaj manuskriptan. E-o devas pruvi, ke ĝi posedas riĉan kulturon, tamen ne fermitan en muzeoj kaj klubaj libroŝrankoj, sed facile alireblan por ĉiuj, almenaŭ elektronike (CD, interreto).

Kvare necesas konsciiĝi precipe la esperantistojn mem, ke internaciaj lingvoj estas por la publiko antaŭ ĉio fonto de informoj. Se la homoj ne trovos en E-o enciklopediojn nek verkojn pri sia fako, nek informojn, kiujn ili nun serĉas ĉe la angla, ili devos resti fidelaj al tiu lingvo, ĉar Esperanto malgraŭ sia facileco neniel helpos ilin.

-mm-

EL NIAJ KLUBOJ

Brno: La klubo renkontiĝas merkrede en *Občanský klub*. Starobrněnská 15, ĉiam iu el la klubanoj havas prelegon. La klubo kunlaboras kun esperantistoj en partnera urbo Stuttgart. Dum 1999 la kluba biblioteko riĉiĝis je sesdeko da novaj titoloj. Venontjare la klubo festos sian 100-jariĝon.

Jubileo en Česká Třebová

La 7-an kaj 8-an de aprilo festis EK Česká Třebová sian 40-jariĝon. Vendrede vespere okazis amuza vespero kun dancado, en programo kontribuis per sia kantado s-ano Smyčka. Sabate la 8-an de aprilo komenciĝis solena inaŭguro denove per kantoj de s-ano Smyčka kaj poste prezentis sian Esperantan programon (kantado, dancado, fabelo) infanoj el E-rondeto, kiun gvidas s-anino Novotná. Sekvis salutvortoj interalie ankaŭ de urbestro, s-ro Pásek, kiu partoprenis la solenon, sciante pri laboro de EK kaj laŭdante ĝin.

Prezidantino s-anino Novotná en sia parolado preparolis la 40-jaran laboron de esperantistoj en Ĉ.T., kiu estis vere tre riĉa. Oni eĉ ne kredus, kiom da aktiveco povas efektiviĝi dum tiu tempo, ne nur por si mem, sed ankaŭ por proksimaj EK kaj ankaŭ por unuopaj esperantistoj, kiuj tre volonte partoprenas la aranĝojn en Ĉ.T. Ni menciuj tradiciajn Silvestrojn, maskobalojn ktp., kiujn ofte vizitas gastoj el eksterlando. Grava estas ebleco havi en Urba Muzeo ankaŭ E-fakon, al kiu kontribuas multaj gesamideanoj el la tuta lando. Ni ne

povas forgesi ankaŭ komplezon helpi kaj organizi asociajn aranĝojn - konferencojn, komitatajn kunsidojn. S-anino Novotná ankaŭ parolis pri reciprokaj vizitoj de esp. infanoj kiel ĉe ni, tiel en eksterlando. En dua parto post tagmanĝo la infanoj mem parolis pri tiuj vojaĝoj, rakontis pri siaj travivaĵoj dum vizitoj en Francio, Belgio kaj same pri okazintaĵoj dum vizito de infanoj el eksterlando. Ili devis paroli Esperante, ĉar ĉiam ili loĝis en familioj. Sian programon montris ankaŭ geknaboj el Ratiškovice sub gvido de Jana Melichárková, kiuj venis por viziti geamikojn el komunaj aranĝoj. Interesa estis ankaŭ programo de Pavla Zemanová el Prago, kiu prezentis sian ĉarman hundon Corra: tiu montris kiel hundoj povas helpi al handikapuloj, ekz. al tiuj, kiuj vivas sur rulseĝo aŭ al epileptikuloj. Corra plenumis ĉiujn taskojn, kiuj estas necesaj por helpi al handikapuloj. Kaj kelkajn, simplajn eĉ en Esp. - ekz. kuŝu, staru, sidu, boju.

Poste ĉiuj elektis siajn premiojn de riĉa tombolo, sekvis salutvortoj de gastoj el diversaj EK kaj interbabilado. Interese estis, ke la programon partoprenis gepatroj de esp. infanoj, kiuj kune kun ĉiuj ĝuis bonan etoson de la aranĝo. Fine necesas danki al EK Ĉ. Třebová por ilia oferema ĝisnuna laboro kaj samtempe deziri por venontaj jaroj multajn fortojn, entuziasmon kaj sukcesojn.

Věra Podhradská



Opava: Esperanto-klubo nun membras ĉe la silezia kultur-asocio *Matice slezská* (Matiĉni 2a, 746 01 Opava). Komitatoj: Ing. V. Kočvara (prez.), Ing. Jan Kovařík (sekr.), Ing. J. Caletka, J. Solnický. Entute 27 klubanoj. La klubo presas kaj distribuas Starton, somere organizis la 12-an medicinistan konferencon kaj preparis konferencan libron. En loka gazetaro aperis 24 artikoloj, J. Žák prezentis 42 prelegojn pri E-o en lernejoj. J. Caletka partoprenis en la kolumbia Bogota la IV-an tutamerikan E-kongreson kaj sav-laborojn post ter-tremo. En 1999 okazis 36 mardaj klubaj kunvenoj.

Ostrava: Klubo EZOKO (Jana Maluchy 126/7), preparas por siaj membroj programojn kulturajn (ekz. pri Ĉinio, Hindio, Turkio, teatro) kaj ekskursajn (ekz. Vřesna, Odry, Štítina). Pasintjare ellaboris projekton por informado pri Esperanto en lernejoj.

Ostrava-Vítkovice: La klubo nun situas je adreso Zengrova č. 71, 2-a etaĝo maldekstre. La printempa programo proponas prelegon pri la aŭstralia angla lingvo (J. Suchánek), 7-a renkonto de eksa junularo el 50-aj jaroj kaj jubilea renkontiĝo sur Cantorija.

Praha: La klubo renkontiĝas vendrede en Rybná 25/27, eldonas Bültenon kun tradukoj de J. Patera el Hašek (*Supo por malriĉaj infanoj, Joĉjo Nový rakontas pri fianĉiĝo de sia fratino*) kaj aliaj interesajoj.

Ratiškovice: Adonido la naŭan fojon.

Danke al la tradiciaj organizantoj Jana Melichárková kaj Milena Buřinská, la 15-ar. de aprilo 2000 jam naŭan fojon esperantistoj amasiĝis en Ratiškovice por admiri la belecon de rara kaj protektita kreskaĵo adonido printempa.



Sed ne restis nur ĉe tio. La komenco de la renkontiĝo estis spicita per spektaklo de infanoj - partoprenantoj de Esperanto-kurso en Ratiškovice, kiuj prezentiĝis unue kiel simpatia bestaro kaj sekve kantis kelkajn kantojn - ĉio ĉi memkomprene en Esperanto. Alproksimiĝo de Pasko ankaŭ ne estis forgesita. Loka popolartistino Lada Kadlčíková prezentis teknologion de man-

produkto de belaspektaj ornamitaj paskaj ovoĵoj, kion kelkaj pli kuraĝaj ol mi persone provis. Por mi estis komplete nova la informo, ke la plej malfacila afero nuntempe estas akiri bezonatajn blankajn ovojn, ĉar modernaj kokinoj ne tro zozgas pri la bezonoj de popularaj artistoj kaj eĉ antaŭ Pasko durkape demetas nur brunajn (aŭ almenaŭ brunetajn) ovojn.

Dum la rigardo ni sukcesis iom nutri nin krom per popularo ankaŭ per pli realaj bongustaj nutraĵoj kun kafo aŭ teo kaj jen - jam atendis nin kelkkilometra promeno al la naturprotektejo Horky (15.5 ha), la plej riĉa loko en Ĉeĥio je adonido printempa, bele flava floro, sed venena kreskaĵo, jure protektata pro sia rareco. Mi vidis ĝin unuan fojon en mia vivo kaj pretas atesti, ke la aspekto valoras la piedvojon por havi ŝancon ĝin admiri.

Post iom da ripozo sur la floranta herbejo, laŭ alia itinero, ni atingis la duan celon tiutagan, same agrablan, nome vinkelon. Tie jam atendis nin gulaŝo kaj precipe bongusta vino. Ĉu mirinde, ke la tempo rapide kaj agrable pasis dum babilado kaj kantado sub gitarakompano fare de Milena?

La naŭa Hlaváček estas for. Kaj mi jam nun ĝojatendas, ke ankaŭ por la jubilea deka, kiu okazos en la unua jaro de la tria jarmilo, la organizantoj mendos same belan sunan veteron kaj ke denove regos tie same agrabla estoso.

Petro Chrdle

Třebíč: Preparas la ĉi-jaran Someran E-Tentaron en Lančov:

2.7.-15.7.2000 unua etapo

16.7.-29.7.2000 dua etapo

30.7.-12.8.2000 tria etapo

En tri' gradoj: A komencantoj, B progresintoj, C konversacia (Esperanto, 674 01 Třebíč)

Znojmo: E-klubo preparis la ekspozicion "Per Esperanto al internacia interkompreniĝo". Ĝi estas en tre bela ekspozicia medio de Ŝtata Distrikta Arkivo en Znojmo. La ekspozicion estas eble viziti de aprilo 2000 ĝis marto 2001 (lunde kaj merkrede 08.00-17.00 h), kolektivaj grupoj povas viziti la ekspozicion ankaŭ dum restantaj labortagoj (8-14 h).

La klubaj kunvenoj merkrede en klubejo DDM (Znojmo, ul. Curie 1).

Franca paro geedziĝis en Ĉeĥio

Gesamideanoj Gudule Le Pichon kaj Laurent Cuenot kun tria filineto Lola kaj ĉevalino Camille travintris en Hladké Žitovice (*Starto 1/2000, p. 17*) kaj la 8-an de aprilo decidigis oficialigi sian kunvivadon per geedziĝo antaŭ urbestro de Fulnek en muzeo de J.A. Komenio kaj en moraviaj naciaj kostumoj.

AEH: Printempa seminario

okazis en Skokovy (9.-16.4.2000) kun partopreno de 28 personoj. En tri kursoj instruis J. Drahotová, L. Filipová kaj M. Severa. Kulturalan programon riĉigis J. Mráz per prelego pri J. W. Goethe kaj liaj lastaj amoj. La partoprenantoj ekskursis al Mnichovo Hradiště kaj kastelo Humprecht.

Ĉeĥio dum jarcento

La historio de ĉeĥaj landoj dum lastaj 100 jaroj rapidis per tempo absolute nekredebla. Por kio pli frue sufiĉis monatoj aŭ semajnoj, tio nun daŭras nur 1 tagon aŭ eble 2 tagojn, eĉ ja horojn. Kion renkontus ĉeĥo el fino de la pasinta jarcento, se li aperus en mia samtempo? Kiaj ŝanĝoj lin surprizus?

Li vivus en ŝtato, pri kiu li tiam eĉ ne revis. Ne nur en memstara ĉeĥa ŝtato, sed ja en respubliko! La habsburgan imperiestron anstataŭigis en 1918 Ĉeĥoslovaka respubliko, kies demokratia politika sistemo fariĝis por ni legendo. La dudekjaran epizodon de la unua respubliko por 6 jaroj anstataŭigis la Protektorato *Böhmen und Mähren*. La strebon konstrui post la germana okupacio novan demokration forpuŝis la popola demokratio 1948 (Februaro) kaj en 1960 la socialisma Ĉeĥoslovakio. Nur post novembro 1989 nia ŝtato senigis de ĉiuj totalismoj, ekde komenco de jaro 1993 ĝi estas sen Slovakio.

Senkrede la ĉeĥo el la pasinta jarcento mirus super la amasiĝo de ŝanĝoj socialaj. La solida apogo de habsburga ŝtato - la nobelaro - malaperis en enfalejo de la historio jam post la jaro 1918, la religio estis post 1948 senigita de ĉiu influo; ĝiajn grandegajn bienojn ekposedis la agrokoooperativoj. Simile la fabrikoj, laborejoj, hoteloj kaj ludomoj estis alŝtatigitaj. Laboristoj iam starantaj sur lastaj ŝtupetoj de societa ŝtupetaro, por 40 jaroj fariĝis formalaj regantoj de la ŝtato. Kaj niaj nuntempaj kuncivitanoj? La unuaj ŝanĝiĝis en cindron en

naziaj koncentrejoj, la aliaj estis ekspeditaj en la "regnon".

Plej multe terurus la samlandanon el la pasinteco transformo de la vivstilo. Antaŭ nelonge li ankoraŭ admiris la unuan kaleŝon saltetantan sur la strato sen ĉevala jungaĵo kaj hodiaŭ ĉie muĝas kaj fulgas mil aŭtomobiloj, oni vojaĝas ne nur sur la tero, sed ankaŭ sur la akvo kaj peraere. En niaj setlejoj kreskas altaj betonaj domoj. Kaj la damoj? Iam ili kaŝis ĉion sub krinolino, nun oni portas minijupon kaj sunbruniĝas "supre sen."

Nur gastejoj restis en Ĉeĥio plejparte la samaj.

J. Cířová

PAROLIGA KURSO



kun Nikolaa Amuziĝvespero plej verŝajne okazos decembre en Dobřichovice aŭ ĉirkaŭaĵo. Kiuj partoprenis la pasintjaran kurson, rakontis kun entuziasmo, ke ili certe partoprenos ankaŭ la venontan. Ni esperas, ke la ĉijara estos ankoraŭ pli sukcesa. Detalojn ni prezentos en septembro, kiam aliĝiloj estos jam pli aktualaj. La aliĝilojn kaj pli detalajn informojn petu ĉe Jana Melichářková, 696 02 Ratiškovice 938.

Esperanto kiel simbolo

En la ĉehlingva gazeto EKONOM aperis artikoloj *Esperanto ĉisel* (Esperanto de ciferoj, n-o 40/1999) pri la internacia kontista normo kaj *Esperanto světového obchodu* (Esperanto de la monda komerco, n-o 1/2000) pri la reguloj de INCOTERMS 2000. La artikoloj pruvas, ke Esperanto figuras en la subkonscio de la publiko kiel simbolo de internacia interkompreniĝo.

informis Fr. Havlík

Donu ŝancojn al la amfibioj!

Printempe flakoj, fiŝagoj kaj akvaj profundajetoj reviviĝas de voĉoj kaj svarmo de amfibioj. Bufoj kaj ranoj rapidas al stagnantaj akvoj, por ke ili metu siajn ovetojn. Tamen multe da batrakoj ĉiujare pereas sub radoj de veturiloj. Krom tio ili estas ekstermataj kun printempaj forbruligoj de herboj. Batrakoj, iliaj ovetoj kaj ranidoj, salamandroj kaj trituroj kun siaj idaroj estas endanĝerigataj de pesticidoj, artefaritaj sterkaĵoj kaj aliaj ĥemiaĵoj. Amfibioj estas antikva grupo de vertebruloj. Ili ne estas kapablaj defendi sin kontraŭ produktoj de la nuntempa civilizo. Amfibioj estas indikiloj pri poluado de la vivmedio: batrakoj, salamandroj kaj trituroj ne vivas en poluita vivmedio. Protekto de la amfibioj kaj ilia vivmedio estas tute identa kun protekto de la tuta homa socio.

Oldřich A. Fischer

NEZNAME PLATBY ZA CASOPISY

Výzva

s ohledem na to, že jsem obdržel v poslední platbě několik neidentifikovatelných "anonymních" plateb, obracím se tímto na příslušné odesílatele následujících částek, aby mne laskavě informovali. V opačném případě jim bohužel nemohu objednat příslušná esperantská periodika apod.

Částky: 200,- 80,- 530,- 540,- Kč

Ve Vašem zájmu předem děkuji za laskavost.

VI. Hasala

A. Dvořáka 1

696 62 Strážnice



Katolika Sekcio de ĈEA

LA TAGO DE PRELEGOJ KAJ DISKUTOJ

sabate la 20-an de majo 2000 en České Budějovice, Konservatorio, strato Kanovnická 22

La Kredo kaj Kristanismo en Meza kaj Orienta Eŭropo

La prelegontoj el Germanio, Pollando, Hungario, Rumanio, Ukrainio, Estonio kaj Kroatio parolos pri:

- spirita stato de la socio kaj eklezio antaŭ la disfalo de la komunisma potenco
- ŝanĝoj en la naŭdekaj jaroj
- pozicio de la eklezio en la nuntempa ŝtato
- la nuntempa situacio de la socio el la vidpunkto de kristanoj
- ekleziaj aktivecoj celantaj al nova evangeliigo
- perspektivoj en la tria jarmilo

Dum la konferenco estos celebrata meso en Esperanto, kiu estis agnoskita kiel liturgia lingvo. Esperantlingvaj prelegoj estos interpretataj en la ĉeĥan kaj aperos Esperanta-ĉeĥa prelegaro.

Aliĝojn akceptas: Ing. Jan Kalný, Libušina ul. 8, 370 06 České Budějovice

Esperanta-filatela sukceso

Marte (05-11.3.2000) en Brno okazis Tutŝtata ekspozicio de poŝtmarkoj BRNO 2000 (omaĝe al 150-a naskiĝdatreveno de T.G. Masaryk), kiun partoprenis pli ol 200 gefilatelistoj el 19 landoj kaj Ĉeĥio.

Sukcese ĝin partoprenis ankaŭ s-ano Vladimír Váňa per sia eksponaĵo

"Ĉapitroj el historio de Esperanto", al kiu estis aljuĝita granda orumita medalo. Arĝentan medalon ricevis la E-kolekto de s-ano Karel Špaček. La ekspozicion sub protekto de la urbestro d-ro Petr Duchoň kaj de Eŭropa Federacio de Filatelaj Asocioj vizitis ĉiutage pli ol mil vizitantoj.

-vlha-

Ĉeĥa poŝto ree propagandas Esperanton

en la poŝtofiĉejo de Strážnice per dulingva klišeto "Esperanto sekcio 31jara 1969 200 La espero". Aŭtoro ing. ark. Karel Kuča, gravuro Karel Pavlíček. La Esperanto-sekcion de Asocio de Ĉeĥoslovakaj Filatelistoj kunfondis oktobre 1969 A. Bartošik kaj V. Hasala



(kiu ĝin prezidas) kun neesperantista filatelisto Josef Šolc

Bicikli tra Ĉeĥio

64-jara franca esperantisto M. Zephirin Jegard, 13 rue du Val Joselin, 22120 Yffiniac, volas bicikli en Ĉeĥio inter la 15-a kaj 20-a de majo kaj serĉas kurbiciklanton.

Josef Cink

Lingvaj ludoj kaj enigmoj (1)



Pluraj uzantoj de la lingvo post kiam ili atingis certan nivelon de ĝia posedo eksentas tenton ludi kun la enhavo kaj formo de ĝiaj vortoj kaj frazoj. Tiu ludado estas bazita sur ŝercaj kaj surprizaj vortaj kaj literaj kombinoj kaj vual-similecoj. La ludado poste efektiviĝas en formo de diversaj enigmoj kaj problemoj proponitaj al la ceteraj ludemuloj por diveni. Iuj nur divenas, sed aliaj ankaŭ kreas ilin.

Tiu ĉi divenado kaj kreado de lingvaj ludoj kaj enigmoj estas ne nur amuza, sed ankaŭ instrua:

1. Ĝi disvastigas nian vort- kaj fraz-provizon, devigas nin ofte serĉi en nia memoro kaj vortaro. Estas vere, ke kelkaj procentoj da tiamaniere ensorbata vortstoko estas rare uzebraj por ilia troa specialeco aŭ artificeco.

2. Ĝi instigas nin trovadi sinonimojn, preskaŭsinonimojn kaj difinojn de vort-sencoj. Per tio ĝi nin instruas esprimiĝi flankmaniere aŭ eksplike, se ni ne povas tuj kapti en memoro la konvenan vorton.

3. Ĝi instruas nin pensi logike, laŭregule, kombini, serĉi aliajn solvojn, enpensiĝi en menson de enigmo-kreanto.

Ni komencu nian "kurson" per t. n. **enskribaj enigmoj**. Ĉe ili ni enskribas vortojn per sinonimoj aŭ difinoj proponitajn en diversforme aranĝitajn kampetojn aŭ sur punktojn. En ili povas esti

kaŝitaj vortoj aŭ frazo, kiun ni malkaŝos post la solvo de la enigmo. La loko de tiu kaŝaĵo estas anoncita en la "kampetaro" per diference signitaj kampetoj. La kaŝaĵo povas esti aparte aludita (suflorita) sinonime aŭ difine.

Unu el tiuj enigmoj estas

KOLONO

La kampo por enskribi la literojn havas formon de kolono laŭlace longa kaj larĝa. La kaŝaĵo povas esti lokita komence aŭ ene de la kolono. Jen la ekzemplo:

Propono	Solvo
- mezurunuo por likvaĵoj	LITRO
- nedifinita aĵo	AFERO
- ĉefo	ESTRO
- postsigno	SPURO
- familiano	PATRO
- aroma vaporigema likvaĵo	ETERO
- retropaŝado	REIRO
- senkompensa dono	OFERO

Kaŝaĵo: titolo de la Esperanta himno:
LA ESPERO.

- kolombe murmuri
- ne ĉesi
- gambo
- stelo
- tegi
- maldonema
- sekreta skribsignaro
- malriĉa

Kaŝaĵo: naskiĝurbo de Esperanto

Solvo: kVeri, dAŭri, kRuro, aStro,
kOvri, aVara, ĉlfro, pOvra
= VARSOVIO

Divenu (la ĝustecon de viaj solvoj komparu venonte)

- 1.
- ĉefurbo de Aŭstrio
- energio por agi
- reĝa lando
- sufokiĝi per akvo
- greno
- perdi la konscion
- logi
- sen elstarajoj
- stato
- aŭdorgano

Kaŝaĵo: Esperanta insigno

- 2.
- K . . . eksterajo
- K . . . akvoŝaltilo
- K . . . plantproduktejo
- K . . . danĝera stato
- K . . . borderaĵo de bildo
- K . . . grasajo de lakto
- K . . . kaŭzo
- K . . . melodiaĵo
- K . . . reĝa kapornamo

Kaŝaĵo: esperantista "titolo"

Kelkaj interesaj frazeologiaj esprimoj

mrzlo, aĵ snih křupal - tiom frostis, ke la neĝo kraketadis
aĵ dělal, co dělal, nešlo to - li povis fari ĉion ajn, tamen li ne sukcesis
je to na beton - ĝi nepre okazos
mám toho po krk - tio tedegas min
krátit si dlouhou chvíli - forpeli enuon
dveře doléhají - pordo ĝuste fermiĝas

buď(te) tu jako doma - sentu vin kiel hejme

vězet až po krk v dluzích - droni en ŝuldoj ĝis super la oreloj
nic ve zlém! - ne ofendiĝu!

bolí mě v kříži - mia dorso min doloras
kručí mi v břiše - mia ventro murmuras
udělal kus práce - li multon faris

sednout někomu na lep - lasi sin trompi de iu

leze mi do zelí - li ŝovas nazon en mian vazon

přijít z deště pod okap - trafi el pluvo en rivero

jak k tomu přijdu? - ĉu mi meritas tion?

dělat z nouze cnost - fari mienon fieran al ludo mizera

kam vítr tam plášt - havi ĉiun horon alian moron

počítám, že to zvládnu - mi opinias, ke mi primajstros ĝin

nechtěl bych být v jeho kůži - mi ne volus esti en lia situacio

brankář byl absolutní špička - la golulo estis absoluta korifeo

David Sláva

Voltero

Altrangulo vizitis volteron en kastelo de Fernez kaj estis gastame akceptita. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis pli ol sufiĉaj kaj tre bonkvalitaj. La frandema gasto venontan tagon deklaris, ke li volas pasigi ses semajnojn en la kastelo de Voltero. Voltero iom ektimis, malgraŭ tio respondis kun rideto:

"Eble vi ne deziras simili al Don Quijote. Tiu opiniis gastejon kastelo, dum vi male kastelon gastejo."

Kelkaj interesaj vortoj

andulka (ondo)papageto
bacist se baci
batolit se kvarpiedi
brambŭrky ĉipsoj
bunda anorako
chlebník panujo, pankonservilo
chňapka fornoganto
chodítko irigilo, pašlemilo
diskman poŝdiskilo
dětská postýlka kradlito
domáci mazlíček dorlotbesto
dudlik cicumo, suĉumo
džíny ĝinzo, ĵinzo
graham branpano
hamburger hamburger(aĵ)o, burgero
hihňat se hihĥi
hit ŝlagro, furorkanto
klackovitá léta spitaĝo
kokosová moučka kokosa raspajo
količek tukpinĉilo
krokodýlek krokodileto
minutka tujpreta manĝo
mobil poŝtelefono
moje stará mia samhejmulino
naběračka ĉerpilo
nášlapový koš pedalsitelo, pedalrubujo
nočník pispoto
ohrádka pro batole ludkaĝo
otvírák na konzervy elladigilo
parátko dentopikilo
pásky do auta seĝzona streĝigilo
pizza pico
popkorn krevmaizo, pufmaizo
sandál bez paty zorio
sluchátka kapaŝkultiloj
sponzor sponsoro
strašit děti bubui
tahák kaŝhelpilo, suflorpapero

televizní seriál dramserio
toaletní papír necespapero
tričko T-ĉemizoj
trojkolka triciklo
váleček na těsto rulknedilo
vločka (dámská) menstrusorbilo,
-tampono, -tuko
vozik v prodejně aĉetĉareto
vrácené drobné restmono
vytočit číslo diski numeron
vytukat číslo klavi numeron
vývrťka korkotirilo
walkman (poŝ)kasedilo
zip zipo, fulmofermilo
zip suchý lapo, lapfermilo
zkratka (cesta) ŝparvojo
žvanit blablai

HUMURO



Sokrato

Kiam la granda greka filozofo atendis en karceroj sian morton, vizitis lin lia edzino Ksan-tipo kaj komencis lamenti, kia terurajo estas morti senkulpa.

"Freneza virino," ekkoleris la filozofo, "evidentas, ke vi prefere vidus min morti kulpa."

Erasmus de Roterdamo

La granda renesanca humanisto kaj filozofo estis ne nur sprita kritikanto de la eklezio kaj de la feŭdismo, sed ankaŭ granda frandemulo.

Foje, ĝue manĝante rostitan anseran femuron, li bedaŭre suspiris:

"Malmulte la Kreinto pensis pri ni, doninte al araneo ok piedojn kaj al la ansero nur du!"

MANIFESTO 2000

Grupo da Nobel-premiitoj iniciatis subskriban kamapanjon de UNESKO kun celo, ke 100 milionoj da homoj sin devontigu praktiki senperforton. En la Interreta paĝo de Unesko aperas la Manifesto en pluraj lingvoj: inter ili ankaŭ en Esperanto.

Aliĝu al la internacia movado por la kulturo de paco kaj senperforto

* Ĉar la jaro 2000 devas esti nova komenco, ŝanco por transformi - ĉiuj kune - la kulturon de milito kaj perforto en kulturon de paco kaj senperforto

* Ĉar tiu transformado postulas partoprenon de ĉiu el ni kaj devas prezenti al gejunuloj kaj estontaj generacioj la valorojn, kiuj povas inspiri ilin krei mondon bazitan sur justeco, solidareco, libereco, digno, harmonio kaj prospero por ĉiuj

* Ĉar la kulturo de paco povas fundamenti daŭripovan evoluon, protektadon de la medio kaj la bonfarton de ĉiu

* Ĉar mi konscias pri mia parto de respondeco antaŭ la estonteco de la homaro, precipe antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj

mi devontigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia regiono:

1. **Respekti ĉiun vivon.** Respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ antaŭjuĝoj

2. **Rifuzi perforton.** Praktiki aktivan senperforton, rifuzante perforton en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psikologia,

ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskantoj

3. **Dividi kun aliaj.** Kundividi miajn tempon kaj materiajn rimedojn, praktike malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon.

4. **Aŭskulti por kompreni.** Defendi la liberecon de esprimado kaj la kulturan diversecon, ĉiam preferante dialogi kaj aŭskulti, ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj rifuzado de aliaj.

5. **Konservi la planedon.** Favori respondecan konsumadon kaj evoluigon kiu respektas ĉiujn vivo-formojn kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo.

6. **Remalkovri solidarecon.** Kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, por kune krei novajn formojn de solidareco.

Subskribu MANIFESTON 2000 en Interreto (www.uea.org/2000.html) aŭ per normala poŝto al adreso de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando:

Propra nomo

Familia nomo

Naskiĝdato Sekso: ina vira

Urb(et)o

Lando

Dato

Subskribo

Ĉiuj subskriboj estos prezentitaj al Ĝenerala Asembleo de UN en septembro 2000.

Informoj el la tuta mondo

■ En 1995-j krasnodara regiona filio "ANEKO" de tutrusia organizo de invalidoj de la Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj komencis aperigi esperantlingve 90-minutan sonrevuon "Voĉo de Amikeco". Dumjare aperas 4 numeroj. Aŭskultante la sonmagazinon vi povos ekscii pri E-movado en Rusio kaj eksterlando aŭdi kantojn kaj literaturajojn, kiuj estas plenumitaj dum E-renkontiĝoj kaj E-kongresoj. Ĝi enhavas ankaŭ sonigitajn artikolojn el rusiaj kaj eksterlandaj E-periodaĵoj.



■ En Yomiuri-Shinbun, la plej kvanta ĵurnalo en Japanio (kaj eble mondo) kun 10 milionoj ekz. tage, la 29-an de januaro aperis artikolo de s-ro MIYOSI Etuo, prezidanto de la kompanio Swanee (Swany), ganto-fabrikanto, pri lingvaj problemoj de japanoj kaj Esperanto kiel taŭga solvo.

■ Tridek-minutan filmon pri la tradicioj de nia lingvo, la Esperanta literaturo kaj kulturo elsendis la 16-an de januaro 2000 la televidkanalo KTVM en Vraca.

■ Japanaj eldonaĵoj en 1999: *Nova Kurso de Interparolo en Esperanto*, (konversacio), *Elektitaj eseoj pri literaturo* (Miyamoto Masao), *Vivo kaj verkoj de Miyamoto Masao*", *Raportoj el Japanio 2* de Hori Yasuo, *La ĉevalo de Motizuki* (muziklibro), *Ĉu vi parolas Esperante?*, *Diag Reveracioj* (Oomoto), Egawa Harukuni tradukis bildrakonton, *Minakata Kumagusu*, biografio de fama japana natursciencisto. Japanlingvaj estas *Pri esperantaj libroj* de Yamaguti Mitio, *Tri semajnoj en Pollando* de

Tahira Masako, *Tena* de Spomenka Ŝtimec faritan de Mori Singo.

■ Universala Komputila Lingvo (UKL) estas projekto de japanaj sciencistoj, kiu ebligas al uzantoj de Interreto skribi kaj ricevi tekstojn en sia gepatra lingvo komunikante eĉ kun eksterlando. La programo unue tradukos la tekston al UKL, poste al gepatraj lingvoj de la ricevantoj.

■ En brazilia urbo Ubé komence de decembro la urba konsilantaro akceptis leĝon, laŭ kiu estas unue nuligitaj antaŭaj decidoj malpermesantaj instruadon de Esperanto, kaj due oni rekomendas al lernejoj laborigi prioritare instruistojn, kiuj apud sia ĉefa fako kapablas instrui ankaŭ Esperanton.

■ Novembre 1999 okazis en Roterdamo kunveno pri lingvo-politiko rilate al nia movado kaj al la ekstera mondo. Oni pridiskutis rolojn de la Akademio, de Terminologia Esperanto-Centro, de bulteno *Informilo por Interlingvistoj* kaj revuo *Esperanto Studies*, de retaj diskuttrondoj pri instruado, terminologio kaj esperantologio.

■ Projekto *Indiĝenaj Dialogoj* klopodas helpi al indiĝenaj popoloj, kies lingvo kaj kulturo estas minacataj malaperi, saviĝi per Esperanto kaj retroŝto. Kursoj okazas en Nederlando.

■ La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) planas la aperigon de novaj helpiloj ligitaj al la filmo "Mazi en Gondolando". Sed unue oni volas enketi la instruistojn, ĉu ili konas kaj utiligas Mazi, ĉu la kurso kontentigas la atendojn. kiom aĝas la lernantoj, ĉu la kurso taŭgas por ĉiu aĝo-grupo kaj kio

estas aldoninda. Skribu al: Atilio ORELLANA ROJAS, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag; Nederlando

La Esperantisto de la Jaro 1999

Intervjuon kun la laŭreato, prezidanto de UEA Kep Enderby, alportis la gazeto "La Ondo de Esperanto".

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Unue, kun grandaj surprizo kaj miro. Memoru ke mi Esperantiĝis nur en 1987. Kompare al multaj aliaj, mi estas relative novbakita Esperantisto. Tamen, mi taksas ĝin granda honoro kaj provos pravigi ĝin.

La internacia elektantaro aparte menciis pri du flankoj de via aktivado: komunuma (aktiva partopreno en esperantistaj kongresoj: UK, SAT, Azia kaj naciskale) kaj movada (precipe la sukcesa pledo por Esperanto en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seulo). Kia, laŭ via opinio, devas esti la ekvilibro inter la interna kaj ekstera flankoj de la vivo esperantista?

La respondo grandparte dependas de decido de la individuo, ĉar tia ekvilibro estas afero de juĝo. Ĝenerale, vidate de la vidpunkto de la Esperanto-movado, ege gravas kapablo sufiĉe bone regi la lingvon, kaj tio bezonas tempon. Kontraŭe, samtempe egale gravas movaĉde, la kapablo eksposti al neesperantistoj la valorojn de la uzo de Esperanto por komunikiĝi kun alilingvanoj. Kadre de tio, ege gravas la estimo de viaj konatoj en la neesperanta mondo. Rimarku, ke

mi ne uzas la esprimon *internacie* ĉi tie, ĉar, parolante

tute persone, kaj mi esperas honeste, malgraŭ ĉiuj aktualaj problemoj en la mondo -- tiom ofte kaŭzataj de la malbena de politikoj de aparteco aŭ de identeco -- mi persone kredas ke la koncepto de nacioj estas artefarita. La celo de Esperanto estas pliharmoniigi la popolojn de la mondo kaj ne helpi en la disigado de ili.

Kiujn tendencojn en la nuntempa Esperantujo vi opinias plej subtenindaj?

Ĉiujn, kiuj celas la atingon de la baza idealismo de la origina Esperanto-ideo. Ĉi tie mi aludas ne al la distingoj inter, ekzemple, finvenkismo kaj raŭmismo, nek al la respektivaj meritoj de tiuj du Esperanto-skoloj aŭ -vidpunktoj, sed al la espero ke ĉiuj homoj, interlingve, sen rigardo al lingvaj, rasaj, aŭ aliaj etne similaj kulturaj baroj, vivu laŭ spirito de frateco.

Dankon. Kaj kion vi opinias negativa?

La kontraŭajn de tiuj, kiujn mi ĵus menciis: ĉiujn kiuj elmontras mankon de toleremo al aliaj kaj al tiuj aliaj vidpunktoj kaj tendencoj: alivorte, tiujn kiuj sektigas Esperantistojn. La homa naturo estas tia kia ĝi estas, la elekto inter la du ne ĉiam estas facila.

Al kiu(j) persono(j) vi mem donus via(j)n voĉo(j)n, se vi estus elektanto ĉi-jare?

Tio estas malfacilega demando. Fakte, spite de mia plezuro ricevi tiun honoron, mi havas dubojn pri la meritoj de sistemoj laŭ kiuj honoroj estas donataj.

Honoraj sistemoj havas kaj pozitivajn kaj negativajn flankojn. Sendube devas esti multaj, multaj aliaj meritindaj Esperantistoj, nekonataj al mi, kiujn estus malĝuste preterpasi. Ne ĉiuj el ili estas anoj de UEA. Tamen mi opinias, ke se oni volas doni tian honoron al homo, escepte laŭ eksterordinaraj cirkonstancoj, oni devus ne doni ĝin al profesia Esperantisto, kiom ajn meritplena li estas. Se vi premas min, inter miaj konatoj, estas multaj kiuj meritas tian honoron. Mi pensus pri iuj el miaj kolegoj en UEA, ekzemple Renato Corsetti kaj Michela Lipari. Menciindaj ankaŭ estus Mark Fettes, Lee Chong-Yeong, Yamasaki SeikSx, Giorgio Silfer, kaj Paulo Desajlley. Mi ĝojas, ke mi ne devas fari konkretan decidon.

Iam populara demando: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, estante ekzilota al neloĝata insulo?

Respondo dependus de kiom longe mi restus sur la insulo. Sufiĉus diri ke mi unue pensus pri "La danĝera lingvo", "La Dekamerono" kaj "Sed nur fragmento".

Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

Nepre bonega, kvankam, ĉar mi ne estas aŭguristo, pri detaloj mi ne volas konjekti. La baza ideo de Esperanto restas bonega kaj ĝi inspiris multajn homojn dum la pasinta jarcento. Tio daŭros, kaj sendube la mondo estus pli bona loko, se pli da homoj uzus Esperanton. Tamen oni devas memori,

ke uzata lingvo estas multe pli ol lingvo elektita de uzanto. Ĝi estas identigilo. *Lingvo* ankaŭ estas formo de superstrukturo, multe influita de la ekonomika kaj socia bazo, testamentita al popoloj kiuj vivtenas sin kadre de tiu ĉi heredita ekonomika kaj socia bazoj. Kontraŭe, iagrade, *lingvo* reciproke influas tiujn ekonomikan kaj socian bazojn.

La rezulto estas, ke okazas speco de objektiva historia procezo, en kiu la personaj voloj kaj preferoj de homoj rolas multfoje nur margene, kvankam kelkfoje grave. Ankaŭ politikistoj havas siajn proprajn rolojn. Ankaŭ ŝanco ludas gravan rolon. Ĉiurilate, la kaŭzoj de la nuntempa hegemonio de la angla lingvo memevidente konfirmas ĉiujn tiujn faktorojn. Ĉu tiu hegemonio daŭros, mi ne scias. Racio favoras Esperanton, sed racio ne ĉiam regas en la reala mondo. Intertempe, Esperantistoj ĉie -- ĉu anoj de UEA, ĉu de SAT, ĉu ano de iu ajn speco de alia Esperanto organizo -- devus strebi alvoki al tiu racio kaj plejefektivigi la realajn, idealismajn kaj praktikajn valorojn de Esperanto kaj eksponi tiujn al la cetera mondo. La monda esperantistaro estas minoritato ĉie, sed tio ne signifas, ke ĝi devas esti sen influo laborante por plibonigi la mondon.

Ĉu vi havas komentojn pri la kvar kritikaj rimarkigoj faritaj en "Esperanto en 1999"?

Nur por diri, ke vi pravis. Mi neniam sugestis ke la tasko faciligos.

Intervjuis Aleksander Korjenkov

Solena kunveno okaze de SIA en Vieno

Okaze de Semajno de Internacia Amikeco (SIA) Aŭstria Esperantista Federacio (AEF) kaj Aŭstria Fervoja Esperanto-Federacio (AFEF) komune aranĝis la 15-an de februaro 2000 solenan kunvenon en la libertempejo de la fervojistoj en Vieno. Inter preskaŭ trideko da partoprenantoj estis ankaŭ reprezentantoj de Ĉeĥa LA de IFEF. La programo konsistis el alparoloj de reprezentantoj de la partoprenantaj organizoj, la pli posta ĉefa programero estis triparta diaprojekciado de inĝ. Walter Huber, la AFEF-prezidanto pri Tajlando. Ĉeĥa reprezentanto kaj Ĉkn de IFEF Jindřich Tomášek salutis en la nomo de IFEF kaj la Ĉeĥa LA de IFEF-FISAIC ĉe invitis al la 52-a IFEF-kongreso en la tagoj de 13-a ĝis 19-a de majo 2000 en Budapeŝto, al la Printempa Konferenco de Ĉeĥa LA de IFEF okazonta 24/26 de marto en nordmoravia banurbo Jeseník, pri la eldonita nova trilingva fakterminaro Ĉina-Esperanta-Angla en Ĉinio kun sume 20319 fakterminoj fervojaj kaj pri la lastatempa aktivado de la Ĉeĥaj Fervojoj. La sukcesa aranĝo finiĝis per vespera amika babilado de la partoprenantoj en internacia lingvo.

J. Tomášek

17-a Internacia Festivalo en Trier

realiĝos inter la 27-a de decembro 2000 kaj la 3-a de januaro 2001 en plej malnova germana urbo kun romiaj

memoraĵoj. Temas pri aranĝo por mezaĝuloj (25-55 jaraĵoj), kaj familioj (kun aŭ sen infanoj). Junulara renkonto okazos samtempe en alia loko. La festivalo estos adiaŭo kun la malnova jarmilo kaj bonvenigo de la nova. Kotizo inter 255 kaj 285 EUR (laŭ dato de pago), por infanoj kaj adoleskuloj sub 25 jaroj inter 120 kaj 205 EUR. Skribu al Hans-Dieter PLATZ, Postfach 1148, DE-34303 NIEDENSTEIN

8-a Internacia Esperanto- Semajno de la kulturo kaj turismo

(30.9.-7.10.2000) en la kataluna Blanes, hotelo apud maro. Pliajn informojn: H.F.E.A., Apartado 15027, 08080 Barcelona, Hispanujo, faks. 937836511, tel. 937275021, mail: luis_serrano@mixmail.com

Zamenhof-tago en Vieno

Pola Instituto en Vieno en kunlaboro kun Aŭstria Esperantista Federacio AEF, Aŭstria Fervoja Esperanto-Federacio AFEF kaj E-redakcio de Radio Vieno ORF aranĝis sabate la 18-an de decembro 1999 solenan Zamenhof-Tagon. Varia kultura programo gvidata de vicprezidanto de AEF s-ro Emil Vokal konsistis el prelegoj, koncerto de polaj artistoj, alparolo de eksterlandaj gastoj kaj filmprezentado "Tero el maro", islanda dokumentfilmo pri vulkana aktivado kaj kresko de novaj insuloj en apudeco de Islando dum lastaj jardekoj. -jt-

Por ĉiuj aĝoj

Nur mezlernejan abiturientan ekzamenon vi bezonas por studi esperantologion ĉe Interlingvistikaj Studoj en Poznan (Universitato Adam Mickiewicz) dum 3-jara kurso gvidata de profesoroj M. Duc Goninaz, H. Tonkin, J. Wells, d-inoj V. Barandovska-Frank kaj K. Smideliusz kaj I. Ertl.

La interlingvistikaj studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, traktado pri planlingvoj, gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialigi ankaŭ pri metodiko.

Surloka kurso (sesio) okazos unufoje dum la semestro (en septembro kaj februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos Atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Kotizo por unu semestro: 400 USD (por nepagipovaj landoj 350 PLZ = 90 USD). Aligilon petu de:
d-rino I. Koutny
Lingvistika Instituto de UAM
ul. Miedzzychodska 3-5
PL-60-371 Poznan
ikoutny@amu.edu.pl

Esperanto Redakcio de Pola

Radio informas, ke ekde la 26-a de marto 2000 vi povas aŭskulti niajn ĉiutagajn elsendojn laŭ la Universala Tempo je:

08.30 h - nur per satelito
13.30 h - 41,18 m; 41,23 m = 7285, 7275 kHz (la premiera elsendo)

18.00 h - 41,98 m = 7145 kHz
19.00 h - nur per satelito

Por aŭskulti laŭ la mezeŭropa tempo vi devas aldoni 2 horojn.

Internacia Koresponda Esperanto-Klubo

serĉas novajn gesamideanojn tutmonde. Ĉe nia klubo oni eldonas gazeton, kiu disvastiĝas inter abonantoj-klubanoj. Se vi deziras aliĝi al la klubo, kontaktu Morgun Timur, ab. k. 279, Lipeck, RU-398050, Rusio.

UK 2001 ESTOS KONGRESO DE DIALOGO



Laŭ decido de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, la jaro 2001 estos Internacia Jaro de Dialogo inter Civilizoj. La Loka Kongresa Komitato de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo proponis al la estraro de UEA dediĉi la temon de la kongreso al tiu Internacia Jaro.

La estraro unuanime akceptis la proponon de LKK kaj vortumis la temon kiel "Kulturo de dialogo -- Dialogo inter kulturoj".

IKUE- kongreso

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kongresos en Italio de la 2a ĝis la 8a de septembro 2000. La Kongreso estos partopreno en la jubileo, kun pilgrimo / vizito al kelkaj gravaj jubileaj lokoj. La Kongreso okazos en Rimini, ĉe la adriatika strando, kun tagaj vojaĝoj al Loreto - Asizo - Gubbio - La Verna kaj Romo. La Kongreso estos ĉefe religia, tamen ne mankos turismaj kaj distraj momentoj. Ĝi estas malfermita al ĉiuj, ankaŭ alireligianoj, kiuj deziras ekkoni la signifon de la jubileo kaj de pilgrimado laŭ la katolika tradicio. Prezoj varias laŭ datoj, lando, elektota loĝado. Ene de majo, la kongresa kosto (kiu inkluzivas ĉion - loĝado en dulita ĉambro, vojaĝoj, programo, manĝoj, krom trinkaĵoj) estas 360 eŭroj por landoj "A" (laŭ klasifiko de UEA) kaj 150 eŭroj por landoj "B". Specialaj tarifoj por kongresanoj el Ĉeĥa Respubliko, Pollando kaj Slovakio. Rabatoj por gejunuloj!

Interlerneja Centro de Lingvoj en Braziljo

Revene al Braziljo je la 13-a de Aprilo, d-ro Zamenhof-Zaleski, nepo de nia Majstro, prelegis al la gelearnantoj de unu el la ICL (Interlerneja Centro de Lingvoj), ŝtata lernejo de lingvoj, ligita al Eduka Fondaĵo de Brazilia, kiu zorgas pri baza kaj mezgrada lernejoj de la Federacia Distrikto, kun ĉirkaŭ 400.000 gelearnantoj. Tiuj gelearnantoj rajtas elekti unu el la lingvoj instruataj en la pluraj Interlernejaj Centroj de Lingvoj. Ordina-

re, tri lingvoj estas instruataj - la angla, la hispana kaj la franca, tamen Esperanto ekrajtis konkondiĝi per leĝo de Deputito Jorge Cauhy, en 1996, kaj pro vigla agado de instruisto de la angla, Josias Ferreira Barboza, kaj de la tiama direktoro de la plej granda ICL, Devanizio Apolin-Elrio dos Santos (ambaŭ esperantistoj, kompreneble), ankaŭ Esperanto estas de tiam instruata. Hodiaŭe, du pliaj instruistoj ankaŭ partoprenas tiun ĉi gravan agadon en Braziljo.



STUDO PRI LA ESPERANTISTA PACLABORO

UEA eldonis ĝisdatigitan version de la historia skizo de d-ro Ulrich Lins pri la kontribuo de UEA al paco. La nova 12-paĝa kajero, "La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo", aperis en la Esperanta kaj angla-lingva serioj de Esperanto-dokumentoj.

La angla kajero estas utila informilo por distribuo inter ne-esperantistoj, ekz. dum konferencoj, foiroj kaj ekspozicioj, ĉar ĝi prezentas konkrete la laboron de esperantistoj kiel gravan socian agadon anstataŭ simpla hobia. UEA aperigos ankoraŭ francan tradukon de la kajero. Tradukoj al aliaj lingvoj ekz. fare de landaj asocioj estas tre dezirindaj.

NI KONDOLENCAS

* La 2-an de marto 2000 forpasis **Jan Kafka** (EK Ostrov) en aĝo de 78 jaroj. Li laboris en urania minejo en Jáchymov, loĝis kun la familio en Ostrov nad Ohří kaj la tutan liberan tempon dediĉis al Esperanto. Kunfondinto de EK Ostrov, organizanto de kursoj, koncertoj, internaciaj renkontiĝoj (Amikeco trans limo).



* La 22-an de marto 2000 forpasis en sia 73-a jaro s-ano **Karel Kopecký** el Hradec Králové
* la 12-an de februaro 2000 mortis Dr. **Libuše Bláhová** el Prago en sia 79-a jaro



Jen ni publikigas foton de s-ino **Marie Bartovská**, kies nekrologon ni alportis en la pasinta numero.

PARDONPETO

en la pasinta numero de Starto malaperis al mi la numero 75, sekve mi el ĉiuj 75-jaruloj faris 80-jarulojn. Mi petas ilian pardonon kaj publikigas korekton.

75 jaroj

Bínová Marie, Praha 10-Petrovice,
Doležalová Jaroslava, Žďár n. Sázavou
Donhofová Eda, Jablonec n. Nisou,
Fiedler Vladimír, Hradec Králové 3
Horký Jaroslav, Hynčína
Jany Jiří, Opava
Kadlecová Vlasta, Plzeň-Křimice
Maudrová Helena, Praha 4
Moucha Květoslav, Železný Brod
Pokorný Jan, Hluboká n. Vltavou
Sádlo Pravoslav Dr., Praha 6
Tyrala Miroslav, Nový Jičín
Urbancová Olga, Karlovy Vary
Votoupal Silvestr, Ing., Frýdek Místek,

Duobla eraro okazis ĉe s-ino Višková el Netvořice, kiu estas nur 73-jara (eraro en la asocia komputilo).

FOTOKONKURSO

S-ano Pavla Zemanová venkis konkurson de Urala Esperantista Societo kaj "La Ondo de Esperanto" pro sia foto de hundino Daja pripensanta super lernolibro de Esperanto. Kun diplomo ŝi ricevis ankaŭ librojn *William Auld 75-jara*, *Lingvaj Respondoj* de Sergio Pokrovskij kaj *Vivo kaj morto de Wiederboren*. Ni gratulas.



MEMBROSTATISTIKO DE UEA 1999

Ankaŭ en 1999, por la 13-a sinsekva jaro, UEA havis pli ol 7000 individuajn membrojn, nome 7074 en 119 landoj. Tiu nombro estis je 286 malpli alta ol en 1998. Pli forte malkreskis la nombro de aligitaj membroj: de 12812 en 1998 al 12096 en 1999. La suma membro-nombro de UEA sekve falis el 20172 al 19170, t.e. per 1002 membroj.

En 20 landoj estis pli ol po 100 individuaj membroj: Francio (686), Germanio (587), Brazilo (552), Japanio (409), Usono (389), Nederlando (349), Svedio (255), Italio (253), Finnlando (234), Britio (230), Hispanio (190), Ĉinio (187), Belgio (185), Ruslando (170), Pollando (150), Svislando (134), Hungario (122), Kroatio (109), Danio (108) kaj Ĉeĥio (102).

La nombro de aligitaj membroj malkreskas jam tutan jardekon. Ili estas tiuj membroj de la aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Pli ol 200 aligitajn membrojn nombris Germanio (1079), Japanio (1062), Ĉinio (963), Italio (895), Svedio (686), Britio (510), Belgio (504), Usono (429), Pollando (330), Hispanio (329), Nederlando (293), Norvegio (292), Greklando (271), Portugalio (268), Brazilo (265), Hungario (232), Finnlando (213), Kroatio (210) kaj Slovakio (207).

En la jaro 2000 la aligita membraro ŝajnas finfine denove kreski. Jam pli ol triono de la landaj asocioj pagis por aligitaj membroj ĝis la komenco de aprilo. La ĝisnuna nombro superas per

923 la nombron, por kiu la samaj asocioj pagis pasintjare. Kun tia evoluo estas eble, ke la tuta membraro de UEA en 2000 denove superos 20 000.

Lepsika Librofoiro

La eldonejo KAVA-PECH estis unu el 110 ĉeĥaj eldonejoj, kiuj ekspoziciis po 10 librojn marte en la konata Lepsika Librofoiro. Inter tiuj 10 titoloj estis pluraj Esperanto-lingvaj, nome "Modernaj rimedoj de komunikado", "Gramatiko de Esperanto" de Malovec, plie la "Ĉeĥa-Esperanta vortaro" de Kraft, "Terminaro de feloj" de Středa kaj unu traduko de Esperanto en la germanan, nome "Einfach tschechisch sprechen" (origine "Baza ĉeĥa konversacio") de Chrdlová kaj Malovec.

KAEST 2000

La kolokvo pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko realiĝos inter la 10-a kaj 13-a de novembro 2000 verŝajne denove en Prago kun temo: ekonomio. Do niaj fakuloj fermos la 20-an jarcenton kaj la 2-an jarmilon per diskutado pri ekonomiaj perspektivoj de la homaro kaj pri terminologiaj perspektivoj de Esperanto. Inf. KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

UEA-delegito por Ĉeĥio

Nova delegitino de UEA por Ĉeĥio fariĝis Lucie Karešová (28j.), junulara reprezentantino en ĈEA-komitato. Ŝia adreso: Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší

Kiel klarigi la propedeŭtikan valoron de Esperanto

Kiam lernantoj lernas anatomion, la plej taŭga instruilo estas artefarita skeleto sen vundoj aŭ aliaj difektoj. La ostoj de la kapo estas plie dismeteblaj kaj la studentoj povas esplori la cerbon (kio ĉe natura skeleto ne eblas). Lerninte pri la ideala skeleto, ili povas pli facile kompreni la difektojn de veraj skeletoj. Regula kaj dismetebla modelo kiel unua lernaĵo - jen propedeŭtiko.



Esperanto estas regula kaj dismetebla modelo de lingvo, kiu ebligas pli facile kompreni konjugadon, deklinadon kaj ankaŭ derivadon. Neregulajn formojn en la naciaj lingvoj oni ofte ne povas dismeti kaj analizi, dum la tute regulajn formojn de Esperanto oni ĉiam povas segmenti je prefiksoj, radikoj, sufiksoj kaj finaĵoj. Se instruata kiel la unua fremda lingvo, Esperanto helpas pli facile lerni ankaŭ aliajn fremdajn lingvojn kaj pli profunde kompreni la gepatran. Jen la propedeŭtika valoro de la internacia lingvo.

En la praktiko la eksperimentoj tamen ne ĉiam montris konvinkajn rezultojn. Ofte okazis, ke instruistoj-esperantistoj, klopodante havi plej bonajn rezultojn, donis al la geknaboj "eminente" tute senmerite, eĉ kiam ili preskaŭ nenion sciis. La geknaboj, sentante sin kvazaŭ

laboratoriaj kunikloj, al kiuj oni ion trudas, intence spitis kaj sabotis la Esperanto-instruadon kaj tiom pli energie lernis la anglan. Tio tamen ne estas pruvo kontraŭ la propedeŭtika valoro de Esperanto, sed nur kontraŭ la tradado.

mm

Ĉu vi konas la nomojn?

Ĉu vi povas helpi al mi trovi personojn aŭ informon? En la jaro 1947, 17-jara skolto, esperantisto, Stanislav Polanský, skribis al usonano, ankaŭ esperantisto kaj skolto. Stan lernejis en České Budějovice kaj kun siaj amikoj deziris korespondi kun usonanoj kaj usonaniĝoj! Stan mortis en 1950. Aliaj nomoj: d-ro Aug. Tatky de A. Tirs gimnazio, České Budějovice, Marie Josová, Máša Dostálová, lernantinoj kaj esperantistinoj - ĉu iu konas la nomojn... iu kiu estas 70-jara?

Kathy Richardson, 27 Colonial Lawns,
Bath NY 14810 USA

TRI-LIMA KLUBO

La 8-an de marto 2000 estis en Thionville fondita Esperanto-Klubo de la Tri-Lima Lando (Luksemburgio, Germanio kaj Belgio). La leĝa agnosko eblos profiti senpagan ĉambbron por regulaj kunvenoj, bibliotekon kaj instruilaron. La klubo projektas "Praktikan Staĝon de Parolata Esperanto" (aŭtuno 2000), "Nacian Kongreson de Franca Fervojistia Esperanto-Asocio (printempo 2001) kaj Kongreson de SAT-Amikaro (Pasko 2001 aŭ 2002).

KALENDARO 2000

aprilo-decembro Vystava Esperantom k mezinárodním dorozumění ve Státním okresním archívu Znojmo, Divišovo nám. 5, návštěvní dny: pondělí a středa.

20.5. Tago de Pralegoj, České Budějovice, IKUE

27.5. Eksjunularo en Ostrava-Vitkovice

2.-4.6. IRDEN 2000 en Plavy

11-15.6. 22-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS-22) en Hradec Králové. Infor: Joana Lewoc, Karl-Schwarzchild-Weg 6/319, 37077 Göttingen, Germanio

17.6. Renkonto en Svitavy

18.6. Jubilea renkonto sur Ĉantorija

2.7.-12.8. 48-a SET Lančov

24.7-3.8 UK Tel-Aviv

16.9. E-Tago Pardubice

30.9. Lanškroun

22-29.10. Skokovy

novembro Polička

10-13.11. Kolokvo pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, temo: ekonomio. Kava-Pech, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

decembro Paroliga Kurso kun Nikolaa Vespero en Dobřichovice

LIBROSERVO

Od doby uveřejnění nabídkového seznamu pro rok 2000 byla naše zásoba knih obohacena o další velmi zajímavý titul:

4.12 Věra Ludíková: Uslyšet duši 1 + 10

Nejkrásnější báseň ze sbírky "Ekaŭdi la animon / Uslyšet duši" (katalog. čís. 4.09) ve svém českém originále spolu s uměleckým překladem do dalších 10 jazyků: angličtiny (tr. W. Auld), ĉinštiny, francouzštiny, italštiny, němčiny, polštiny, ruštiny, slovenštiny, španělštiny a esperanta. 96 Kč

Korespondi deziras

Grupo da mez- kaj alt-lernejaj studentoj - komencantoj deziras korespondi tutmonde. La unuan leteron adresu al kursestro: Jaroslav Žák, U Střelnice 20. 746 01 Opava, Ĉehio.

El la kunveno de la komitato

La Komitato kunvenis 11.3.2000 en Prago kaj traktis pri:

- Lucie Karešová kiel nova ĉefdelegito de UEA
- La ĈEA-konferenco okazos en Znojmo 13/15 de oktobro 2000

- KAVA-PECH kiel peranto por UK

- akiritaj ejoj por Libroservo

- Paroliga kurso antaŭ sankta Nikolao

- grantoj de ĈEA por kluboj kaj sekcioj (vidu Starb 1/2000, p. 4)

Rozpočet ČES na r. 2000

Příjmy

členské příspěvky	100 000,- Kč
tržby Libroservo	30 000,- Kč
písemné kursy	5 000,- Kč
tržby Starto	1 000,- Kč
člen.přísp. SŽ (IFEF)	3 000,- Kč
přijaté úroky	2 000,- Kč
dary	20 000,- Kč
dividendy	2 000,- Kč
konference ČES	60 000,- Kč
KAEST	5 000,- Kč
prodej cenných papírů	82 000,- Kč
nespecifikované příjmy	30 000,- Kč
celkem	340 000,- Kč

výdaje

spotřeba materiálu	20 000,- Kč
odbyt.náklady Libroserva	10 000,- Kč
cestovné	40 000,- Kč
poštovné	40 000,- Kč
telefony, Internet	15 000,- Kč
funkční příspěvky	7 000,- Kč
nákup služeb	5 000,- Kč
daně a poplatky	7 000,- Kč
konference ČES	60 000,- Kč
Starto	100 000,- Kč
náklady pís. kursů	6 000,- Kč
odměny	10 000,- Kč
muzeum Ĉ. Třebové	2 500,- Kč
podpora činnosti klubů a sekcí	10 000,- Kč
nespecifikované výdaje	7 000,- Kč

celkem 340 000,- Kč

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
Internet: cea @ tnet. cz
www.kuk.cz/cea/
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (31. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto

Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (31-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto

Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1